Baltiaj Esperanto Tagoj
ŠIAULIAI

# SAGISTO

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt**
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET43

ĈIUTAGA INFORMILO DE **BET-43**

**N-RO 1** | 2007 07 14, SABATO

## BONVENON AL ŠIAULIAI!

Jen kelkaj konatigaj informoj pri la urbo, kiun vi vizitas. Šiauliai [Ŝaŭlej', Esperanta formo devus esti Ŝaŭlo] laŭ grandeco estas la kvara urbo de Litovio kun 147 000 loĝantoj.

En la jaro 1236 apud ĉi tiu loko okazis granda batalo de litovaj gentoj kontraŭ invadintaj glavistoj el Livonio. La malamiko estis disbatita. En Livonia kroniko estas skribita loknomo Saule, kiu devus signifi Ŝaule, sed la vorto saulė litove signifas suno, do oni ekŝatis tion kaj iam diras: Batalo de la Suno. Ankaŭ Šiauliai estas nomata Urbo de la Suno. Tamen la urbonomo devenas de la vorto šaulys (pafisto, sagisto), kaj tiu – de la vorto šauti (pafi).

La militoj ege damaĝis la urbon: dum la Unua Mondmilito estis detruitaj 65% da domoj, dum la Dua – ĉirkaŭ 80 % da konstruaĵoj. Do nun vi vidas la urbon, kiu rekreskis el fajro kaj cindro, kiel mitologia birdo Fenikso.

La urbo situas en oportuna loko kaj estas grava nodo de surteraj vojoj kaj fervojoj. Tio kaŭzis ankaŭ evoluon de industrio. Jam en la 19a jarcento estis konstruita granda fabriko de leda industrio, aparteninta al Ch.Frenkel. Antaŭ nelonge Šiauliai famiĝis per produktitaj bicikloj kaj televidiloj.

En Šiauliai funkcias Pedagogia Universitato kun pli ol 10 000 studentoj, du kolegioj, kvar gimnazioj kaj 12 mezlernejoj, dramteatro, multaj muzeoj. La urbon vizitas ĉiam pli multe da gastoj – dum lastaj du jaroj nombro da eksterlandaj turistoj kvinobliĝis.

Ankaŭ Esperanto-movado en la urbo havas longajn tradiciojn: jam en Zamenhofaj Adresaroj estas nomoj de 12 esperantistoj. La unua E-kurso en Šiauliai okazis en 1923, kaj en 1925 formiĝis E-grupo. En Šiauliai loĝis kaj agis eminentaj litovaj esperantistoj L.Noreika, B.Giedra, Č.Liutikas, V.Vaitekūnas k.a. Post longa interrompo la movado renoviĝis en 1957, aktivis E-klubo „*Ruto*". R.Rutkauskas verkis la historian studon *RUTO* LEVIS ESPERON pri la agado de urbaj esperantistoj.

**La Organiza Komitato de BET-43**

## GRAVAJ ATENTIGOJ

BET-43 funkcios en du korpusoj de la universitata konstruaĵo. La aranĝoj plejparte okazos en ejoj de la dua korpuso. Tie funkcios registrado, libroservo, ĉiuj prelegejoj, redakcio de la ĉiutaga informilo "Sagisto" kaj organiza komitato.

**En la unua korpuso** estas ĉefsalono, kafejo, biblioteko (komputilejo). Por trovi bezonatajn ejojn rigardu anoncojn kaj montrilojn. Kafejo estas inter la dua kaj la tria etaĝoj. Tie okazos tagmanĝoj por BET-anoj. Unu tagmanĝo kostas 10 lidojn, sed ne 15, kiel estis anoncite pli frue. Tagmanĝkuponojn oni aĉetu dum registrado por la tuta periodo. Menuon eblos vidi dum registrado. Biblioteko estas sur la tria etaĝo. Tie pli ol 10 komputiloj kun retaliro uzeblas por BET-anoj.

**En la dua korpuso** aŭditorioj 7, 14, 15, 16, 17, 22 havas ĉiujn modernajn teknikaĵojn. La plej grandaj aŭditorioj estas 7, 17, 22. Sur la unua etaĝo (teretaĝo) estas aŭditorioj 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10. Sur la dua etaĝo estas aŭditorioj 11, 12, 13, 14, 15, 16, 17, 18, 19, 20, 21. Sur la tria etaĝo estas aŭditorio 22, organiza komitato (ĉambro 28) kaj redakcio de "Sagisto".

Sabata komuna organiza kunveno de partoprenantoj okazos en la ĉefsalono (ĉambro 203 en la unua korpuso). Samloke okazos koncerto de ensemblo el Pollando.

Dimanĉaj matenaj organizaj kunvenoj okazos ne en la ĉefsalono kiel anoncite en la programo, sed en aŭditorio 7 (de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj E-kursoj) kaj en aŭditorio 17 (de gvidantoj kaj prelegantoj de somera universitato).

Prelego de prof. Aloyzas GUDAVIČIUS okazos en aŭditorio 17. Lecionoj de ĉiunivelaj E-kursoj okazos en aŭditorioj de la unua etaĝo de la dua korpuso.

Lanĉo de libro de Romualdas RUTKAUSKAS okazos en aŭditorio 17. Lanĉo de libroj de J.R.R. TOLKIEN okazos en aŭditorio 17. Baza konatiĝo kun litova lingvo okazos en aŭditorio 10. Koncerto de la fakultata ensemblo okazos en la ĉefsalono je la 15a horo, sed ne je la 16a, kiel anoncite en la programo.

## Objektoj de tuttaga ekskurso

**Kražiai** [Kra'ĵej] estas urbeto malgranda, tamen kun riĉa kaj fama historio. Ĝia nomo estis konata jam en 1257. Post kristanigo de Ĵemajtio en 1413, ĉi tie en 1416 estis konstruita la unua preĝejo en la regiono. Same ĉi tie en Kražiai plej frue eklo ĝis monaĥoj jezuitoj, ili en 1614 fondis kolegion, kiu estis la unua lernejo de pli alta rango en Ĵemajtio. En la 18a jc. en la kolegio studis pli ol 400 lernantoj, kolegia biblioteko posedis pli ol 3000 librojn, funkciis lerneja teatro. La kolegio ludis gravan rolon en klerigo de la lando. Dum carisma epoko Kražiai famiĝis pri kruela perforto de la registaro kontraŭ kredantoj. En 1891 rusa registaro ordonis fermi monaĥejon kaj preĝejon. La homoj malobeis kaj defendis sian sanktejon. En 1893 ĝendarmoj kaj kozakoj aranĝis sangan buĉadon, dum kiu 9 homoj pereis, estis 44 grave vunditaj kaj centoj da arestitoj.

**Kelmė** [Kel'me] estas distrikta urbo kun 10 mil loĝantoj. Funkcias riĉa etnografia muzeo kun ekspozicioj: pri grandbienuloj Gruževskiai; pri germana verkisto Karl May kaj Amerikaj indianoj; pri popolaj vivmaniero kaj arto; pri V.Putvinskis, fondinto de patriotisma Fusilista organizaĵo; pri arkeologiaj esploroj kaj trovaĵoj; pri regiona historio, deportadoj kaj rezistado.

**Monaĥeja ensemblo en Tytuvėnai** [Ti'tuvenaj] apartenis al monaĥoj bernardanoj. La konstruado komenciĝis en 1614. La preĝejo estis konstruita en 1633. Ĝis niaj tagoj konserviĝis preĝejo de S-ta Virgulino Maria, monaĥeja konstruaĵo kun fermita korto, arkada galerio, Ŝtupara kapelo. La plej impona estas la ĉefa altaro, finkonstruita en 1778 kaj prezentanta brilan ekzemplon de baroka arto. Belegaj estas ankaŭ aliaj 8 altaroj. En Ŝtupara kapelo estas 30 ŝtupoj, kiujn preĝantoj grimpas surgenue, ĉar en ĉiu ŝtupo estas muntita sankta relikvo el Jerusalemo.

**Kapelo en Šiluva** [Ŝi'luva]. La urbeto estas sankta loko de katolikaj pilgrimantoj. Ĉi tie, laŭ legendo, en 1608 sur ŝtono antaŭ paŝtistetoj aperis Sankta Virgulino Maria kaj plore plendis pro disvastiĝanta protestantismo. Sub la ŝtono estis trovita kofro kun kaŝitaj ritaj ujoj kaj vestoj de estinta katolika preĝejo. La fakto de la apero de Maria estas agnoskita de katolika eklezio, ĉi tie okazis miraklaj resaniĝoj. En la nuna nova preĝejo imponas belaj rokokstilaj altaroj. Sur la loko de la apero staras kapelo „Sano de malsanuloj", konstruita en 1924.

## Duontagaj ekskursoj

**Monto de Krucoj** pli frue estis nomata Monto de Preĝadoj. Krucoj sur la monteto ekestis jam en 1831, post malvenko de ribelo kontraŭ carisma Rusio. En fino de la 19a jc. L.Krzywicki sur la monteto trovis jam 130 krucojn. Kiel sakrala loko la monteto ekestis komence de la 20a jc. Soveta reĝimo neniigis la krucojn per buldozoj en 1961, sed post ĉiu detruo (ili estis kvar) sur la monteto denove aperadis krucoj, kvankam la teritorion observis ŝtata sekureco. En 1993 la Monton de Krucoj vizitis Roma papo Paŭlo Johano la Dua, sekvontjare li alsendis por starigo ĉi tie sian krucon. Nun ne eblas kalkuli, kiom da krucoj staras sur la monteto. Tie jam mankas loko, do ili elkreskas malsupre ĉe la monteto. La monteto fariĝis loko de pilgrimado ne nur litovaj, sed ankaŭ eksterlandaj vizitantoj.

**Etnografia vilaĝo Dargaičiai** [Dar'gajĉej] estas unika vilaĝo en Norda Litovio de strata tipo (longeco de la strato 420 metroj). Oni vizitos antikvan, preskaŭ 200-jaran, vilaĝon kaj konatiĝos kun plej malnovaj metioj, gustumos antikvajn manĝojn.

## Vizitindaj muzeoj de la urbo

1. Muzeo „Aušra", aleo Aušros 47; ekspozicio pri historio kaj etnografio de Norda Litovio; funkcias: 9-17h, sabate 11-17h, lunde fermita.
2. Vilao de Ch.Frenkel, Vilniaus str. 74; sep salonoj (4 galerioj kaj 3 interioroj); funkcias 10-18h, sabate 11-17h, lunde fermita.
3. Muzeo de bicikloj, Vilniaus str. 139; en la ekspozicio 73 bicikloj kaj 4 velomobiloj; funkcias 10-18h, sabate 11-18h, lunde fermita.
4. Muzeo de fotografio, Vilniaus str. 140; fotografaĵoj, fotiloj, ekspozicioj; funkcias 10-18h, sabate 11-17h, lunde fermita.
5. Muzeo de Radio kaj TV, Vilniaus str.174; tekniko de



Monto de Krucoj: foto de CHOE Taesok

radio kaj televizio, gramofonoj, sonskatoloj; funkcias 10-18h, sabate 11-17h, lunde fermita.
6. Palaco de Venclauskis, Vytauto str. 89; domo de fama advokato kaj lia edzino aktorino. La familio kreskigis kaj edukis pli ol 100 orfojn. funkcias 9-17h, vendrede 10-16h, sabate kaj dimanĉe fermita.
7. Muzeo de fervojo, Dubijos str.44 (ĉe fervoja stacidomo); funkcias 13-16h, vendrede 13-15h, sabate kaj dimanĉe fermita.
8. Muzeo de katoj, Žuvininkų str. 18; ĉ.14 000 eksponaĵoj; funkcias 11-17h, dimanĉe kaj lunde fermita.
9. Muzeo de ekslibrisoj, en urba biblioteko: aleo Aušros 62; funkcias 10-20h, dimanĉe 11-18h, sabate fermita.

## Gravaj informoj pri la ekskursoj

Ĉiu en sia valizeto trovos folion nomatan "Plano de ekskursoj". En la registrejo estos aparta deĵoranto-registranto por antaŭviditaj ekskursoj. Entute estas unu tuttaga (merkreda) kaj ses duontagaj ekskursoj – ĉiutage po unu, ĵaŭde kaj vendrede po du apartaj duontagaj ekskursoj. Ĉiuj duontagaj ekskursoj, krom ĵaŭda, estos posttagmeze.

Oni devas nepre registriĝi por la ekskursoj (precipe por tuttaga kaj por ĵaŭdaj kaj vendredaj duontagaj) ĝis la 17a horo dimanĉe – la 15an de julio. Samtempe oni devas pagi anoncitan sumon.

**Lunda (16.07) duontaga perpieda ekskurso:** dezirantoj kolektiĝas je la 14a horo apud la fontano sur la placo de la Suna Disko apud la katedralo kaj la urba municipo. Gvidos Romualdas RUTKAUSKAS. En la Bicikla Muzeo oni rakontos ankaŭ pri fama esperantisto Liudas ALSEIKA kaj ĉiuj ricevos folion en Esperanto pri li.

**Marda (17.07) duontaga ekskurso:** dezirantoj kolektiĝas je la 14a horo apud la centra enirejo de la konstruaĵo de BET-43 (str. Architektų 1). Estos buso por veturi al la Botanika Ĝardeno.

**Merkreda (18.07) tuttaga ekskurso:** dezirantoj kolektiĝas je la 9a horo matene apud la universitata komunloĝejo (str. Dubijos 1A). Estos buso(j). Minimuma nombro – 35 personoj.

**Ĵaŭdaj (19.07) duontagaj du apartaj ekskursoj** (unu al Monto de Krucoj, la alia al la etnografia vilaĝo Dargaičiai): dezirantoj por ambaŭ ekskursoj aparte kolektiĝas je la 9a horo matene apud la universitata komunloĝejo (str. Dubijos 1A). Busoj laŭvoje povas halti ankaŭ apud la junulara gastejo (str. Tilžės 159) kaj preni loĝantojn tie. Minimuma nombro por ambaŭ ekskursoj aparte – 35 personoj en unu grupo.

**Vendredaj (20.07) duontagaj ekskursoj samaj kiel ĵaŭdaj**: dezirantoj por ambaŭ ekskursoj aparte kolektiĝas je la 14a horo apud la centra enirejo de la konstruaĵo de BET-43 (str. Architektų 1). Estos du apartaj busoj. Minimuma nombro por ambaŭ ekskursoj aparte – 35 personoj en unu grupo.

## KONCERTOJ

**14an de julio (sabate)**
19:00 Koncerto de la muzik-vokala ensemblo "Folk-Rom" el Pollando

**15an de julio (dimanĉe)**
15:00 Koncerto de la ensemblo „KITAVA"
18:00 Partoprenantojn de BET-43 akceptos la dekano de la Fakultato de Sociaj Sciencoj (FSS)

**16an de julio (lunde)**
18:00 Koncerto de Lidija GOMOLICKAITE-GRUDZINSKAITE

**17an de julio (marde)**
17:00 Akcepto ĉe la urbestro en la urba magistrato (ĝis 25 personoj)
18:30 Koncerto en la urba municipo (str. Vasario 16-osios 62)

**18an de julio (merkrede)**
Tago de ekskursoj.

**19an de julio (ĵaŭde)**
18:00 Ensembloj de la popola muziko kaj dancoj „Friponoj" kaj „Va'jaunas". En la salono de la fakultato. Daŭro ĝis 45 min.

**20an de julio (vendrede)**
18:00 Ensemblo de popolaj dancoj „Ĝermetoj"; miksita kant-ensemblo „Agordo". En salono de la fakultato. Daŭro ĝis 50 min.
19:00 Koncerto de la ensemblo de kantelistinoj "Ilga" el Riga.

**21an de julio (sabate)**
18:00 Ensemblo de akordionistoj de la konservatorio. En salono de la fakultato. Daŭro ĝis 45 min.
19:00 Koncerto de la ensemblo "Animo" el Liepaja gvidata de Austre PUMPURE

## NUTRADO

| Dato | Manĝejo | Bufedo |
|---|---|---|
| 07.14. | Ne funkcios | 10-17h |
| 07.15. | 12-14h | 09-16h |
| | Akcepto ĉe la dekano 18h | |
| 07.16. | 12-15h | 09-17h |
| 07.17. | 12-15h | 09-17h |
| 07.18. | ------ | ------ |
| | Ekskursa tago | |
| 07.19. | 12-15h | 09-17h |
| 07.20. | 12-15h | 09-17h |
| 07.21. | 12-14h | 09-15h |
| 07.22. | ------ | ------ |



*M.K.Čiurlionis* (1875–1911): Zodiako — Sagisto

**Salomėja Nėris** (1904–1945)

**S A G I S T O**

*Flamas rondo –*
*La fajra sundisk'. –*
*Tra la mondo*
*Jen paŝas sagist'.*
*Tero frostas, malgajas la tag':*
*Sunon kovras malhela fi-drak'.*
*Nigra birdo jen ŝvebas sub ĝi, –*
*Tra la ombroj videblas neni'.*
*Peto mia*
*Al brava sagist':*
*– Birdon fian*
*Mortpafu sen trist'!*
*Kiel ŝtalo streĉitas muskol' –*
*Iĝu bela la tero laŭ vol'.*
*Ke varmiĝu, rekresku natur', –*
*Jen streĉiĝis sagista statur'.*
*Sunvarmiĝos*
*Denove la ter'.*
*Ni feliĉos*
*En suna liber'.*

**Tradukis Petras Čeliauskas**

## El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadreso: ds@esperanto.lt aŭ en la redakcia ĉambro. Viaj raportoj, anoncoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj al la redakcio plej malfrue **je la 12a horo de la kuranta tago**. Ĉi numeron redaktis CHOE Taesok, kunlabore kun Petras Čeliauskas.

# UTILAJ INFORMOJ




## Poŝtaj afrankoj

| | Al eksterlando simpla | Al eksterlando prioritata |
|---|---|---|
| Poŝkarto | 1,00 | 1,20 |
| Letero ĝis 20 gramoj | 1,30 | 1,70 |

Afrankoj por sendaĵoj al eksterlandoj ne dependas de distanco nek de kontinento, kaj do estas egala ĉu al najbara Latvio, ĉu al fora Aŭstralio.

## Komparo de lidoj kaj eŭroj

| Lidoj | Eŭroj | Lidoj | Eŭroj | Lidoj | Eŭroj |
|---|---|---|---|---|---|
| 0,10 = | 0,03 | 2 = | 0,58 | 10 = | 2,90 |
| 0,20 = | 0,06 | 3 = | 0,87 | 20 = | 5,80 |
| 0,50 = | 0,14 | 4 = | 1,16 | 50 = | 14,49 |
| **1** = | **0,29** | 5 = | 1,45 | **100** = | **28,99** |

## Gravaj litovaj vortoj kaj frazoj

Saluton – Sveiki [svejki']
Bonan matenon – Labas rytas [la'bas ri'tas]
Bonan tagon – Laba diena [laba' djena']
Bonan vesperon – Labas vakaras [la'bas va'karas]
Dankon – Ačiū [a'æju]; dėkui [de'kuj]
Multan dankon – Ačiū labai [a'ĉju labaj']
Ne dankinde – Nėr už ką [ner uĵ ka']
Mi petas – Prašau [praþaŭ']
Bonvolu – Prašom [pra'ŝom]
Mi dankas – Dėkoju [deko'ju]
Mi pardonpetas – Atsiprašau [atsipraŝaŭ']
Pardonu – Atleiskite [atlejs'kite]
Ĉion bonan – Viso labo [vi'so la'bo]
Ĝis revido – Iki pasimatymo [iki' pasima'timo]
Adiaŭ – Sudie [sudje']
Jes – Taip [tajp]
Ne – Ne [ne]
Bone – Gerai [geraj']
Tre – Labai [labaj']
Malbone – Blogai [blogaj']
Mi volas – Aš noriu [aŝ no'rju]
Mi ŝatas – Aš mėgstu [aŝ meg'stu]
Mi ne komprenas – Aš nesuprantu [aŝ nesuprantu']
Kafo – Kava [kava']
Teo – Arbata [arbata']
Biero – Alus [alus']
Kafejo – Kavinė [kavi'ne]
Trinkejo – Baras [ba'ras]
Restoracio – Restoranas [restora'nas]
Kiom kostas – Kiek kainuoja [kjek kajnŭo'ja]